
# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr




**1-a U.K.
1905-2005
Bulonjo ĉe Maro**

**PIV 2005
ĵus aperis**

*Foto: Krešimir Barković*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

Aprilo 2005 76-a jaro, n-ro 4 (1198)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €
9 771163 044279

# El la redaktejo...



*Karaj,*
*jen la nova evento en la vivo de nia Asocio. Temas pri la ĵusa apero de PIV 2005, kiun ni sukcesis eldoni danke al via helpo. Per tio SAT daŭre plenumas sian kulturan rolon. En la sama numero vi trovos tre diversajn artikolojn kaj opiniojn de niaj gekamaradoj. Ni alproksimiĝas al somero kaj nia kongreso kiu okazos ĉijare multe pli frue ol kutime. Do necesas tuj aliĝi ĉar ĝi certe estos unu el la plej gravaj kongresoj pro decidoj kiuj devos esti alprenitaj. Se SAT estas grava por vi, nepre venu ĉar via ĉeesto kaj aktiva partopreno povos esti decidiga. Do, ne hezitu, ĉar krom seriozaj laboroj vi ĝuos belan kulturan kaj distran programojn en bela kaj gastema urbo.*


*Via Redaktoro.*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSRFRPPPAR
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❐
Imprimé par : EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


# PIV 2005
## ĵus aperis



Dum sia vizito al la SAT-sidejo, nia amiko Petro Chrdle pridiskutis kun du PK-anoj pri la ekstera koloro de la nova PIV. Tre atente la triopo ekzamenis diversajn koloreblecojn kaj fine oni elektis la bluan (vidu la foton maldekstre).




Nun la PIV 2005, korektita kaj renovigita estas aĉetebla ĉe diversaj libroservoj kaj evidente ĉe SAT. La vendoprezo estas 80 € + afrankokosto.

Daŭre eblas aĉeti la eldonon de la jaro 1987 je tre favora prezo: 30 €. Tiuj kiuj tute ne posedas Plenan Ilustritan Vortaron nepre aĉetu ĝin. Vi povas fari donacon al viaj geamikoj el nepagipovaj landoj, aŭ kiuj ne povas, faru al si mem tian donacon. Ĝi daŭre estas aktuala kaj uzebla. Ĉiu serioza esperantisto posedu tiun nemalhaveblan vortaron.

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# Kiel funkcias la tutmonda merkat-ekonomio ?

## Konciza resumo por nefakuloj

***Rapida skizo, bazita sur prelego de Suzan Ĝorĝ, vicprezidantino de ATAK, kiun mi aŭskultis en la lernejo kadre de kurso pri bioetiko.***

### Kio estas tutmondiĝo ?

Jen bela vorto, lerte elektita, kiu donas la impreson pri harmonia paca unuiĝo de la homaro. Tial necesas ĝin pli precize difini. Laŭ iu grava kompaniestro, la tutmondiĝo, "estas la libereco por lia grupo investi ĉie laŭplaĉe, estante kiel eble malplej ĝenata de la socialaj leĝoj". La cent plej gravaj transnaciaj entreprenoj regas la ĉefan parton de la merkato. Dua grava motoro estas la financaj grupoj : grandaj bankoj, asekurkompanioj, akcimakleristoj, ktp… Ĉiuj tiuj kontrolas 28 000 000 000 000 dolarojn. Sed nur 10% el tiu sumo reprezentas la du trionojn de la valoro de ĉiuj borse kotaciitaj entreprenoj en Sudameriko, kaj tri kvaronoj de ĉiuj aziaj (escepte de la japanaj). La pezo de tiuj entreprenistoj sur la lokaj merkatoj estas tiel granda, ke kiam ili decidas foriri, por investi en alia pli profitodona loko, ilia foriro provokas la disfalon de jam malstabilaj lokaj merkatoj. Tio okazis en 1995 en Meksikio, kaj en 1998 en Suda Azio. Nur Ĉinio kaj Malajio eskapis el tio, malpermesante la eliron de la kapitaloj. Tiuj transnaciaj entreprenoj havas fortajn ligojn kun la registaroj, kvankam pli kaj pli multaj entreprenestroj iĝas ministroj aŭ eĉ prezidantoj (Buŝ en Usono, la frato de Sarkozi, franca eksministro pri ekonomio, nun prezidanto de la reganta partio (UMP) , estas la vicestro de la mastra sindikato MEDEF…). Tiuj fortaj ligoj faciligas la alprenon de decidoj utilaj al la pligrandigo de la entreprena profito, sed la transnaciaj entreprenoj mem tute ne interesiĝas pri landa regado, ĉar tio alportas neniun profiton. Ili nur bezonas politikan situacion sufiĉe stabilan por ne perturbi la merkaton.


### Kio estas la celo de ekonomio ?

Oni povus naive kredi, ke ĝi estas la studado de la plej efika maniero por kontentigi la homajn bezonojn. Sed la granda plimulto de la liberaluloj senhonte konfesas, ke la ĉefa celo de ekonomio estas la kreskigo de la profito kaj de la « valoro por la akciuloj ». La TTT-ejo de Merryl Lynch (meril linĉ) parolas pri 7 700 000 personoj « kun alta valoro », por kiuj laboras la tutmondaj ekonomiaj strukturoj.

### Kiu diktas la mondajn regulojn ?

Pri ili respondecas la Monda Banko kaj la Internacia Mona Fonduso. Tiuj du organizoj estis fonditaj antaŭ la fino de la Dua Mondmilito, kun milde progresema celo, inspirita de la ideoj de Kejnso : ili celis prunti monon al la deficitaj landoj por helpi al ili plu partopreni en la monda komerco. Tamen, en la fino de la 70aj jaroj, la landoj el la suda duonsfero tro multe pruntis kaj ne reinvestis tiun monon en produktipovaj strukturoj, grandparte ĉar la subvencioj estis kaptitaj de mafiaj "elitoj", kiuj resendis ĝin al svisaj bankoj. Tiam la landoj el la Nordo decidis pri programo de struktura reĝustigo, konata sub la nomo de Vaŝingtona interkonsento : ĝi pruntis monon kun tre altaj interezoj por malebligi la inflacion, kaj puŝis tiujn landojn al eksportado. La problemo estas, ke se ĉiuj landoj eksportas la samajn varojn, la prezoj kompreneble sinkas : tio provokis la senhaltan malriĉiĝon de tiuj landoj, kvankam la elitoj prosperis aĉetante malmultekoste la privatigitajn entreprenojn. La rezulto estis katastrofa por la plimulto de la popolo. Alia rezulto de tiu strategio estas, ke la proporcio de freŝe alvenintaj mafiaj elementoj en la tiel nomata « elito » ne ĉesas kreski.

La monda organizo pri komerco (MOK) fiksas la internaciajn komercajn regulojn. Inter tiuj reguloj troviĝas la malpermeso pristudi la devenon de varo, kiu ebligus al la klientoj elekti ilin laŭ etikaj, kaj ne pure merkataj konsideroj. Pro tiu regulo la eŭropanoj estis punitaj pro la rifuzo importi bovaĵon el bestoj nutritaj per kreskhormonoj. La puno estis takso kontraŭ la franca fromaĝo Rokforo. Tio provokis la koleron de francaj ŝafbredistoj, kiuj ne komprenis kial oni punas ilin pro afero rilata al bova viando. Sed ĉar



*Ĵoze Bove*

neniel eblis kontesti tiun proceduron, anoj de unu el la terkulturistaj sindikatoj, gvidataj de Ĵoze Bove, malmuntis MakDonaldan vendejon por protesti kontraŭ tiu arbitra decido.

La reguloj de MOK ĉiam favoras la transnaciajn entreprenojn. Fakte, la liberalismo, kiu pretendas batali kontraŭ ĉiuj komercaj baroj, estas subtenata de ampleksa regularo rigora kontraŭ subpremataj ekspluatatoj.

### Liberalismo kaj naturprotektado

Unu el la fundamentaj dogmoj de la ekonomia liberalismo estas, ke la ekonomia kreskado solvas ĉiujn problemojn per la mirakla efiko de « nevidebla mano » - « natura meĥanismo » de la kapitalismo laŭ iuj, « Providenco » (= Dio)laŭ aliaj. Fakte, la « nevidebla mano », favora nur al riĉaj kapitalposedantoj, havas kiel naturan efikon pliriĉigi riĉulojn kaj plimalriĉigi malriĉulojn. Ĝi kreas novajn « bezonojn », do novajn laborpostenojn por produkti tiujn varojn. La hoko en la ezoko estas,